

Erik Tantal

La kaŝita trezoro de Ludoviko

Elpensita rakonto



1-a Eldono 2023



Kun AI-generitaj bildoj de Craiyon

Erik Tantal

La kaŝita trezoro de Ludoviko

Elpensita rakonto

1-a eldono 2023

Kun AI-generitaj bildoj de Craiyon



Enhavo

Antaŭparolo.....	3
Kandidatiĝoj.....	4
Tago de la malfermita pordo.....	8
Esploroj.....	11
Rudi.....	14
Ŝtonoj.....	19
La profesoro.....	22
Ludoviko.....	25
Lernado.....	34
En la instituto.....	36
Observado.....	39
Kontraŭspionado.....	43
Danĝero.....	46
En la kantino.....	49
Demandoj.....	52
Salutoj el la antikvo.....	55
Koruptado.....	57
Eksciteco.....	60
Aŭdvida komunikado.....	63
Progreso.....	68
Postparolo.....	70
Kolofono.....	71
Fontoj por la bildoj.....	72

Antaŭparolo

La sekvanta rakonto estas libere elpensita. Ĉiuj similecoj kun vivantaj personoj kaj realaj agoj estas pure hazardaj. Sed temas pri Ludoviko. Kaj la simileco kun la bildo, kiun la historio transdonis, apenaŭ povas esti neata. Mi esperas, ke Ludoviko ĉi tion pardonus al mi per palpebrumo.

Erik Tantal

Hamburgo, 2023

Kandidatiĝoj

Tim ne imagis, ke tio estus tiel malfacila. Li studas arkeologion en la kvara semestro kaj klopodas kandidatiĝi por labori en la universitato kiel studenta asistanto. Tio alportus du avantaĝojn. Unue, kompreneble, li povos gajni iom da mono. Ĉar tio ja ĉiam mankis. Kaj due li gajnos la ŝancon lerni pli pri interesaj esploraj kampoj de la arkeologio.



Arkeologia Instituto [01]*

Tim principe interesiĝas pri epigrafio. Tiu helpscienco kadre de arkeologio okupiĝas pri malnovaj skribaĵoj sur diversaj materialoj. Li sendis aspirajn leterojn al dekduo da diversaj institutoj. Hodiaŭ, post nur unu semajno, li ricevas jam pli ol la duonon kiel rifuzojn. Tie ekzemple legeblas:

"Bedaŭrinde ni devas informi vin, ke ni ne povas akcepti vin kiel studentan asistanton. Viaj kapabloj ne kongruas al la kondiĉoj necesaj por tiu laboro."

Aŭ: "Bedaŭrinde ni decidis akcepti alian aspiranton, kvankam via fono vere impresis nin. Ni deziras al vi ĉion bonan por viaj kariero kaj estonteco."

Ĝuste kian eraron li faris?

Jens, lia longjara amiko kaj studkolego, kompreneble scias la respondon:

"La kaŭzo certe estas viaj leteroj. Ĉu vi vere menciis ĉiujn bonegajn kvalitojn de vi?"

"Kompreneble mi faris tion. Mi eĉ fanfaronis kun miaj lingvaj scioj. Mi flue parolas la anglan kaj la francan. Kaj mi krome skribis pri mia bona komputila kleroj. Kaj pri miaj spertoj eksterlande. Mi estis dum ses semajnoj en Irlando kaj en Francio dum unu

monato. Mi eĉ atentigis ilin pri mia sento de respondeco kaj pri mia alta instigo. Sed eventuale tio estis iomete troigo."



Tim [02]*

"Ja, nun mi komprenas. Vi ne estas taŭga por ĉi tiu tempo. Vi nun nepre bezonas scion pri tria fremda lingvo. Ĉu vi ne pensis pri tio?"

"Ne, unue ne, sed intertempe ja. Mi demandis sekretariinon de instituto. Ŝi opiniis, ke estas tre grave, havi bonajn sciojn en fremdaj lingvoj. Sed mi ne komprenas kial Viktor tuj ricevis la permeson por labori kiel studenta asistanto."

Denove Jens konas la respondon:

"Ĉu Viktor? Ĉu li estas en via seminario? Mi aŭdis ke li venas el Hungario. Tie multaj studentoj lernas la Internacian Lingvon Esperanto. Eventuale tio helpis lin. Sed kial ili faras tion, mi ne scias."

Kompreneble Tim ne estas kontenta. Kiel li povus lerni novan fremdan lingvon, se li samtempe devas studi? Certe pli facile estus labori kiel vendisto en bakejo anstataŭ kiel studenta asistanto.

"Akompanu min al la komuna domo. Hodiaŭ diversaj asocioj tie prezentas siajn informstandojn. Tie ni certe trovos ion, kio gvidas vin al aliaj pensoj", proponas Jens.



Jens [03]*

Tago de la malfermita pordo

Ĉie la homamaso. Je la fino de la koridoro longa vico antaŭ la kuko-stando. Antaŭ tio multaj lokaj asocioj starigis siajn tablojn, plenplenajn de informmaterialo.

Malantaŭ ĉiu tablo staras unu ĝis du personoj, kiuj varbas por sia asocio aŭ iniciato. Pro tio ne estas multe da spaco en la koridoro.

"Bedaŭrinde mi ne trovas ion interesan. Mi nur esperas ke mi almenaŭ ricevos pecon da buterkuko", plendas Tim.

"Kial vi ne interesiĝas pri la ekspozicio? Kulturo, edukado, hobiaj. Tio estas sufiĉe da ofertoj. Ni manĝas nun nian kukon kaj poste ni supreniru unu etaĝon al la standoj pri lingvoj", proponas Jens, "sed antaŭiru. Mi restas iomete ĉe la komputila klubo. Ĉi tie eĉ staras la malnova Sharp-MZ-80A-komputilo el la jaro 1980."

La vizaĝo de Tim eklumas. Li kaptas sian kukon kaj rapide iras al la ŝtuparo.

Ja, nun li finfine trovas ion interesan. Multaj kursoj pri lingvoj. La angla, franca, itala, hispana kaj eĉ la

araba lingvoj prezentiĝas ĉi tie. La germanan por eksterlandanoj li kompreneble ne bezonas.

Sed kio estas tio? Je la fino de la koridoro estas stando de la Esperanto-klubo.

Ĉi tie Tim ricevas informojn pri tiu stranga lingvo. Li lernas ke Esperanto estas planlingvo, publikita 1887 de Ludwik Lejzer Zamenhof. Ĝi estis kreita kiel facile lernebla neŭtrala ilo por internacia interkomprenado.

Precipe la lasta indiko vekas la intereson por Tim. Li prenas flugfoliojn kaj broŝurojn kaj daŭrigas la konversacion kun Petra, kiu deĵoras je la stando.

"Kiom da tempo vi bezonis por lerni tiun lingvon?", li demandas.

"Tion mi ne povas diri. Mi komencis verŝajne antaŭ kvin jaroj. Simple per malnova lernolibro. Ĉiun tagon mi traktis etajn pecojn de la lecionoj. Iom post iom mi progresis. Mi ne scias, ĉu tio daŭris kvar aŭ kvin monatojn. Jam post unu jaro mi povis legi dikajn Esperanto-librojn kaj kompreni eĉ longajn prelegojn."

Petra nun montras kelkajn de la libroj el la staplo kaj ankaŭ longan liston pri retaj Esperanto-paĝoj. Ŝi krome klarigas, kial en Hungario la studentoj ofte

decidas lerni Esperanton. Tie la studentoj devas dokumenti sufiĉan scion de fremdaj lingvoj. Ili ne ŝatas tion, ĉar lernado estas ligita kun granda elspezo de tempo. Sed ili scias, ke Esperanto estas pli rapide lernebla ol aliaj lingvoj.

Oni verŝajne nur bezonas 20 ĝis 30 % de la tempo kiu normale necesas por atingi la saman lingvonivelon kompare kun iu ajn nacia lingvo. Unu kaŭzo por tio certe estas la regule konstruita gramatiko.

Nun Tim havas sufiĉe da informoj. Li ankoraŭ pripensas ĉu li akceptu la inviton de Petra por viziti la Esperanto-klubon.



Petra [04]*

Esploroj

Tim komencas nun mem esplori. En la reto li trovas neatenditan amason da indikoj pri Esperanto. Esperanto vere estas 'internacia'.

Ĉie en la mondo troviĝas homoj, kiuj uzas Esperanton. Sed por kio? Multnombraj publikaĵoj de la asocioj kaj de privatuloj traktas temojn, pri kiuj Tim tute ne interesiĝas. Vojaĝoj en fremdaj landoj, poemoj, rakontoj, invitoj al kongresoj, raportoj pri Esperanto-kunvenoj. Kaj multaj, multaj libroj, parte tradukitaj verkoj kaj origine verkitaj en Esperanto.

En la seminario Tim renkontas sian studkolegon Viktor. Li rakontas pri la sensukcesaj aspiraj leteroj kaj la vizito en la komuna domo.

"Mi ne imagis tion. Oni trovas ja tiom multe da informoj pri Esperanto. Sed ĝis nun mi ĉiam ankoraŭ ne scias kial mi devas lerni Esperanton. Nur por esti akceptita kiel studenta asistanto? Vi ja scipovas Esperanton, ĉu ne?"

"Jes, mi lernis tion en Hungario. Tio ne estis malfacila. Estis inda afero. Alikaze ili verŝajne ne permesis, ke mi laboras en la instituto."

"Por kio vi bezonas Esperanton dum via laboro?"

Viktor reagis en stranga maniero. Li ne tuj respondas. Li turnas sin. Ŝajnas ke li timas iun, kiu povus aŭskulti.



Viktor [05]*

"Ne tiom multe demandu, Tim. Mi devis subskribi deklaron, ke mi neniam parolas kun alia homo pri mia laboro. Do, ĉio, kion mi nun diros al vi, restos nur inter ni ambaŭ. Ĉu vi komprenas?"

Tim ne scias, kion signifas tio. Tamen li ekscias ke Viktor praktike nur faras tradukojn. En la Arkeologia Instituto troviĝas amasoj da tekstoj, kiuj devas esti

tradukitaj. Kaj ĉiu kunlaboranto estas admonita neniam paroli pri la traduklaboro kaj la enhavo de la tekstoj ekster la instituto. Ne estas nur admono, estas minaco. Se oni malobservos sekvos juraj agadoj.

Do, Tim devas nun mem daŭrigi siajn esplorojn. Tiu temo nun ŝajnas iĝi pli kaj pli interesa por li.

Eventuale estas ja kromaj informoj se li kontaktus la Esperanto-klubon. Li telefonas al Petra. Sed ŝi ne povas bone helpi.

"Venu al nia klubo! Simple komencu lerni! Se vi volas, ni ja povus renkontiĝi ĉiun ĵaŭdon unu horon antaŭ la kluba kunveno. Tiam mi povas subteni vin dum viaj ekzercoj."

Tim ankoraŭ ne certas, ĉu li vere volas lerni Esperanton. Malgraŭ tio li konsentas. Li pensas, ke la kontakto al la klubo povus esti tre utila por liaj propraj esploroj.

Rudi

Denove kvar rifuzoj. Ĉiuj sen klarigo. Tim elreviĝinte metas la leterojn flanken kaj koncentriĝas pri la traktaĵo, kiun li devas prepari por la seminario.

Senĉese liaj pensoj vagas tien kaj reen. Por ĉi tiu vespero li decidis iri al la Esperanto-klubo. Li eĉ sukcesis motivi Jens kunveni.



La Verda Stelo [06]

En la klubo Petra salutas ilin gastigeme. "Saluton! Mi ĝojas vidi vin."

Tim kaj Jens ne komprenas ion. Sed iu klinas sin al ili kaj flustras:

"Tio signifas: Hallo, ich freue mich, euch zu sehen."

Estas Viktor. Li ankaŭ partoprenas la kluban kunvenon. La babilado komenciĝas unue nur en la germana lingvo. Tim kaj Jens ricevas la ŝancon prezenti sin. Poste Petra klarigas la planitan sinsekvon. Hodiaŭ Viktor volas prelegi pri Budapest. Por tio li projekcias bildojn al la muro. Li komentas la famajn vidindaĵojn, kompreneble en Esperanto.

Tim kaj Jens ne komprenas multon ĉar nenio estas tradukita. Post duonhoru komenciĝas eta diskuto, ankaŭ en Esperanto. De tempo al tempo venas kelkaj demandoj ankaŭ en la germana lingvo. Evidentiĝas ke ne ĉiu ĉeestanto disponas pri sufiĉa lingvokapablo.

Tim notas, ke la etoso de la vespero estis tre agrabla. Tamen li ne ricevis sufiĉajn informojn pri la uzo de Esperanto. Elirante li denove faras demandon al Viktor:

"Ĉu vi konas iun, kiu scias pli pri la fonoj de via traduklaboro? Mi konscias, mi ne devas demandi multon, sed mi estas ja scivolema."

Viktor grumbleme respondas:

"Ne ĝenu min, Tim. Por tio verŝajne neniuj povas helpi. Sed, povas esti Rudi. Li ja estas tre aĝa. Li verŝajne ne plu estos submetita per premo. Mi proponas ke vi vizitu lin. Alportu al li ankaŭ la novan gazeton de la klubo."

Rudi estas longjara membro de la klubo. Li loĝas en la najbareco. Pro lia aĝo li nur malofte partoprenas la klubajn kunvenojn. Li estas jam pli ol okdekjaraĝa.

En la sekvanta tago Tim telefonas posttagmeze al Rudi kaj bonkondute demandas ĉu mallonga vizito eblas. Rudi permesas tion. Li ege ĝojas, ke post longa tempo venas vizito de iu el la klubo. Li ofertas glason da malvarma minerala akvo. Ambaŭ sidiĝas sur la komfortan sofon.

Tim rimarkas ke oni preskaŭ ne povas vidi la murojn de la loĝĉambro. Ĉie estas librobretoj. Ĉiuj plene pakitaj per libroj.

Rudi tuj registras kien impreson faras liaj libroj al Tim kaj komencas senĉese rakonti 'sen punkto, sen komo'.

"Jes, jes, kiam vi estas en mia aĝo, tiam kolektiĝas multo. Kaj mi ne povis forĵeti eĉ nur unu de tiuj libroj. La dika, ruĝa, vidu tie. Tion mi ricevis de mia avo. Per tio mi komencis lerni Esperanton. Ja, jes, la malnova tempo."

Ne necesas ke Tim rakontas ion pri li mem. Rudi ne ĉesas paroli. Subite li ekstaras kaj petas ke Tim deprenu la bluan fotolibron de la librobreto. Tim grimpas sur seĝon kaj tiras la libron el sia pozicio. Subite eta, verda kajero elglitas kaj falas suben. Rudi trankviligas lin:

"Ne gravas, ne estas granda afero. Tion remetitu poste en la librobreton."

Tim provas iomete enrigardi la kajeron, sed Rudi abrupte tiras ĝin el lia mano.

"Tio ne estas io por vi. Mi tute ne plu scias, pri kio estas tio. Do, atendu."

Tim atendas pacience kaj komencas paroli pri siaj neakceptitaj aspiraj leteroj. Li aldonas:

"Mi miras, ke Viktor tuj ricevis la eblecon por laboro en la instituto, nur ĉar li regas Esperanton."

"Jes, mi ankaŭ aŭdis tion. Ja, mi jam ĉiam diras. Iam la homaro komprenos la signifon de Esperanto."

Rudi trafoliumas la verdan kajeron murmurante:

"Ah, ĉi tie ĝi estas. La ŝtonoj estas plenplenaj de sekretoj. Tio estas trezoro. En tio ĉio estas skribita en Esperanto."

Tim bedaŭras ke li nun devas foriri, sed Rudi bezonas ripozon.



Rudi [07]*

Ŝtonoj

Tim komprenas nenion. Kion signifas tiuj ŝtonoj? Rudi ne donis al li klarigon. Do, la vizito tie ne estis multinforma. En universitata kafejo Tim renkontiĝas kun Jens kaj Viktor. Li demandas:

"Rudi menciis tiujn strangajn ŝtonojn. Ĉu iu scias, kian signifon ili havas?"

Viktor hezitas. Post eta paŭzo li tamen prezentas tiun klarigon:

"Jes, Rudi ankaŭ rakontis al mi pri la ŝtonoj. Ŝajnas, ke iu trovis tiujn specialajn ŝtonojn. Laŭdire oni uzis ilin kiel memorilon por komputilaj datumoj. Rudi supozas, ke la ŝtonoj venis de niaj prapatroj. Sed mi pensas, ke li nur halucinas. Laŭ liaj rakontoj la prapatroj konis Esperanton jam antaŭ ni kaj ĉio estas skribita en la ŝtonoj en tiu lingvo."

"Interese. Tio estus tre bona temo por televidelsendaĵo pri misteroj, ĉu ne?", aldonas Jens.

Viktor mallaŭte flustras:

"Atentu! Kunlaboranto en mia instituto ankaŭ menciis tiajn ŝtonojn. Li laboras en sekcio, kiu provizas nin kun la tekstoj por niaj tradukoj. Li estis grave admonita kaj translokigita al alia sekcio. Nun li estas eĉ ne plu en nia konstruaĵo."

"Jes, tio estas aĉa", konfirmas Jens, "sed tiu afero estas tiel interesa. Por tio ja necesas postuli pliajn informojn! Ĉu ili vere uzis la ŝtonojn kiel memorilon por datumoj?"

"Jes, mi supozas, ke jes. Eventuale ili faris tion same kiel niaj inĝenieroj kun la Tesa-glubendoj aŭ kun vitro. Tiuj metodoj ja uzas laserojn, kiuj brulas la datumojn en la materialojn. Vere, ni devas ekscii, por kio estas la ŝtonoj kaj kiel ili estas traktitaj. Mi denove faru viziton al Rudi", diras Tim.

Tuj post la lasta prelego li ekiras al Rudi. Atingante la domon li miras ke la pordo estas larĝe malfermita. Singardeme li eniras.

"Rudi. Ĉu ĉio estas en ordo?", li vokas kaj trovas ke Rudi kaŭras kvazaŭ kunfaldita sur la planko de la loĝĉambro antaŭ la granda librobreto. La plej multaj el la libroj estas eltiritaj el la librobretoj kaj kuŝas nun sur la planko. Rudi nur plendas kaj daŭre skuas la kapon.

Kio okazis? Rudi antaŭ unu horo iris al la bakejo. La domenrompintoj evidente uzis lian foreston kaj kaŭzis tiun kaoson. Rudi estis tiel konfuzita, ke li eĉ ne povis informi la policon. Tion faris Tim. La policistoj tuj venis.

Ili ekzamenas ĉion kaj faras multajn fotojn. Finfine ili donas al Rudi la konsilon pli bone sekurigi la pordon kaj la fenestrojn. Tiam ili promesas post kelkaj tagoj denove kontakti lin.

Tim ne volas lasi Rudi sola. Li tuj helpas ordigi la librojn. Estas feliĉo ke ŝajne ne estas kromaj damaĝoj. Rudi ankoraŭ ne povas diri ĉu iuj libroj mankas.

Jes, mankas la eta, verda kajero. Sed Rudi rimarkas tion nur iom poste.

Hodiaŭ Tim ne povas plue paroli kun Rudi. Li petas la telefonnumeron de la filino de Rudi. Estas Gisela. Ŝi loĝas en la sama urboparto, nur en distanco de 15-minuta irado. Tim informas ŝin pri la enrompiĝo en la domo de ŝia patro.

La profesoro

"Hola! Parolas Gisela. Dankon, ke vi telefonis min hieraŭ. Mi tuj poste venis al mia patro. Feliĉe ke nenio alia okazis. Ankaŭ mia patro dankas vin, speciale pro via helpo ordigi la librojn."

"Jes, estas bone ke ne estis pliaj domaĝoj. Estas sufiĉe aĉe ke tio okazas je plena taglumo. Sed ĉu ni povas iomete babili pri via patro? Mi havas kelkajn demandojn."

"Kompreneble, jes. Sed ni faros tion ne per telefono. Mi proponas ke ni renkontiĝu je la kvina posttagmeze en la parko antaŭ la kastelo. Vi certe konas la lokon. Do, mi nun finiĝas. Ĝis baldaŭ!"

Tim miras pro la tre mallonga telefona konversacio.

Gisela atingas la interkonsentitan lokon je ĝusta tempo. Ŝi evitis paroli pli longe per telefono ĉar ŝi timas subaŭskultadon. Ŝia patro jam ofte rimarkigis tion. Li opiniis ke li estas kaŝobservita. Gisela ĉiam pensis ke tio estas pro la troa timemo de ŝia patro. Sed ĉifoje vere okazis observado.

La fiuloj subaŭskultis la telefonaĵojn de ŝia patro. Rudi jam delonge estas ilia celo. Ili sciis, ke li nur malofte ricevas viziton. La vizito de Tim verŝajne igis ilin eĉ pli scivolemaj.

Tim ankaŭ akurate alvenas en la parko antaŭ la kastelo.

"Saluton, Gisela. Bone, ke vi havas tempon por mi. Ĉu vi rimarkis, ke la eta, verda kajero mankas?", demandas Tim.



Gisela [08]*

Jes, tion sciis Gisela. Tiu kajero estis speciale grava por ŝia patro. Li ĉiam kaŝis ĝin supre en la librobreto

inter la dikaj fotoalbumoj. Se li trafolumis la kajeron, Gisela jam kiel juna knabino devis promesi neniam enrigardi. Tamen de tempo al tempo li parolis pri la enhavo.

Temas pri aferoj, kiujn Gisela ne povis kompreni.

Nun dum la konversacio kun Tim ĉio plie klariĝas. Ŝia patro antaŭ multaj jaroj havis kontakton al profesoro Koroljow. Li loĝis en Magdeburgo kaj havis bonajn kontaktojn al la Kulturhistoria Muzeo. Tie troviĝis jam delonge bele ornamita skatoleteto kun kvin misteraj ŝtonoj kaj unu eta, verda libro. Tiuj estas la preferataj esplorobjektoj de la profesoro. Li eltrovis, ke tiuj ŝtonoj estis prilaborataj jam antaŭ kelkmiloj da jaroj.

La spuroj je la ŝtonoj montris, ke niaj prapatroj uzis teknikojn, kiuj estis multe pli modernaj ol tiaj, pri kiuj ni disponas hodiaŭ. La plej grava estis, ke tiuj ŝtonoj estis uzataj kiel datumiloj. La aldonita libro donis koncizan klarigon. Sed ĝi estis skribita per literoj kiujn neniuj konas ĝis hodiaŭ.

La profesoro dum siaj esploroj koncentriĝis al buŝaj informoj pri tiu libro. Li konkludis:

La historio de la lingvo Esperanto devas esti tute reverkita.

Ludoviko

En la reto Tim trovas la jenajn informojn pri la kreinto de Esperanto:

Ludoviko (Ludwik) Lejzer Zamenhof vivis de 1859 ĝis 1917. Li naskiĝis en Bjalistoko, kiu tiutempe apartenis al la rusa Imperio. Post kelkaj jaroj li translokiĝis kun sia familio al Varsovio. Tie li laboris kiel okulkuracisto. Li estas konsiderata la kreinto de Esperanto. Laŭdire li okupiĝis pri tiu projekto jam kiam li estis ankoraŭ en gimnazio.



Ludwik Lejzer Zamenhof [09]

Sed la esplorrezultoj de profesoro Koroljow montris ke tiu tradicia bildo ne povas esti ĝusta. Laŭ lia opinio Ludoviko Zamenhof havis kontakton kun iu, kiu sciis pri la ŝtonoj kaj la eta, verda libro.



Profesoro Koroljow [10]*

La profesoro imagis ke la rakonto iras tiel:

Bjalistoko en la jaro 1873

Ludoviko vizitas sian onklon Levi. Tiu loĝas proksime de la fervoja stacidomo. Ĉi tie veturas la fervojo Varsovio-Peterburgo. Levi ĉiam ĝojas kiam lia nevo vizitas lin. Ludoviko estas 14 jaraĝa. Ĉiufoje Ludoviko demandas pri la vojaĝoj, kiuj direktas lian

onklon regule pro komercistaj kialoj al Peterburgo. Ludoviko scias ĉion pri la fervojo, eĉ ke la trajnoj rulas sur reloj kun larĝeco de 1542 milimetroj. Li ege preferus kunvojaĝi, sed li estas ja lernanto kaj devas lerni kaj ekzerci multon.



Malnova lokomotivo [11]*

"Onklo, kion vi kunprenis de via vojaĝo? Ĉu vi montras tion al mi?", li demandas scivoleme.

"Atendu, atendu. Tio certe ne taŭgas por vi kaj tute ne rilatas al la fervojo."

"Ne gravas. Sed ĉi tie en Bjalistoko ne multe okazas. Nur ĉiam la kvereloj sur la strato. Ĉe ni vivas judoj,

poloj, belarusoj, rusoj, litovoj, tataroj kaj germanoj. Kaj ĉiam estas multe da malamikeco."

"Vi pravas, Ludoviko. Tion mi ankaŭ scias. Mi ja loĝas ĉi tie. Sed eventuale tio, kion mi kunportis el Peterburgo tamen plaĉas al vi. Atendu, mi eligos ĝin el mia laborĉambro."

Nun Ludoviko estas vere scivolema. Li eĉ ne trinkas el la taso da teo, kiun lia onklo prezentis al li. Onklo Levi revenas kun bele ornamita skatolo. En ĝi estas eta, verda libro kaj kvin strangaj, rondaj ŝtonoj. Ili estas prilaboritaj kaj ne havas akrajn eĝojn. Ĉiu ŝtono estas markita per unu ĝis kvin nigraj ringoj, metitaj unu apud la alia.

"Ĉu vi donas al mi la libron?", demandas Ludoviko ekscitate.

"Tute neniel! Vi eĉ ne rajtas paroli kun aliaj pri tio. Ĉio el tiu skatolo estas sekreta. Ni havos grandajn problemojn, se iu ekscius pri tio. Kial, mi ne povas diri."

Ludoviko estas seniluziigita. Sed li ne rajtas longe enrigardi la libron. Ĝi estas skribita per strangaj literoj. Pri kio informas la libro?

Ankaŭ pri tio lia onklo silentas. Li ne scias ke Ludoviko disponas pri rara kapablo. Li povas memori ĉion, kion li vidis kun siaj propraj okuloj, punkton per punkto. Estas kiel foti tutan paĝon de la libro kaj la foto restas konservita en lia memoro. Kompreneble li ne kapablas rememori ĉiujn paĝojn tuj. Sed sufiĉas por tri ĝis kvar paĝoj. Tio signifas ke Ludoviko devas baldaŭ denove viziti sian onklon.

Levi miras ke Ludoviko nun tiel rapide foriras. Sed jam en la sekvanta semajno Ludoviko revenas. Tio ripetiĝas ĝis li povas kapti ankaŭ la lastan paĝon. Kaj patro Marko miras ke lia filo jam post tiel mallonga tempo revenas de la vizito al la onklo. Li demandas pri la kaŭzo. Sed Ludoviko malaperas tuj en sian ĉambron. Li devas rapide skribi ĉion, kio estas ĝuste nun en sia memoro.

Dum la venonta tempo oni apenaŭ vidas Ludovikon. Ĉiun liberan minuton li sidas antaŭ la tekstoj kaj klopodas deĉifri tiun strangan skribon. Finfine li sukcesas. Ridante kun ĝojo li montras la rezulton al sia onklo.

Per tio la laboro de Ludoviko ankoraŭ ne finiĝis. Verdire ĝi nur komenciĝas nun. La unua parto de la tekstoj priskribas la strukturon de iu speciala lingvo. La dua parto temas pri la signifo de la kvin ŝtonoj,

kiuj estas en la skatolo. Ludoviko denove plenplene plonĝas en la traktadon de la tekstoj. Li bezonas pli ol unu jaron por kompreni ĉion.

La lingvo estas antaŭulo de la hodiaŭa Esperanto. La libro uzas la nomon 'Relago'. Ĉion, kio Ludoviko povas trovi ĉi tie, li skribas nun per latinaj literoj en kajeron. Tion li donas al onklo Levi. La kovrilo de la kajero estas surgluita per verda papero.

Finfine li trovis ion, kio povas helpi plibonigi la situacion en lia urbo. Ĉi tie li ĉiam denove spertas perfortajn koliziojn inter la diversaj etnoj.

La kialo certe estas la foresto de komuna lingvo, li pensas. Sed nun li disponas pri tiu neŭtrala ilo por interkompreniĝo. Ĝi havas la kapablon forigi ĉiujn lingvajn barilojn. Ne nur en Bjalistoko, eĉ mondscale.

Ludoviko ne ĉesas prilabori tiun lingvon. Ĉiam denove li inventas novajn vortojn, ĉar en 'Relago' mankas multaj, kiuj simple en la pasinteco ne estis bezonataj. Ludoviko kolektas sennombrajn pecojn da papero kun notoj en la malnova ligna ŝranko, kiu staras en lia ĉambro.

Oni povas kompreni, ke liaj gepatroj tre zorgas pri sia filo. Li estas bona lernanto sed kio okazus, se li ne plu

investus forton kaj tempon por la lernejaj taskoj? Kiel li pasus la malfacilajn ekzamenojn? La gepatroj de Ludoviko ja volas, ke post la lernejaj jaroj li iru al la universitato por studi medicinon.

Sed ŝajnas ke por Ludoviko nur gravas unu temo. Li ĉiam pli ofte vizitas sian onklon Levi. Nur kun li Ludoviko povas paroli pri Relago.

"Onklo, ĉu vi helpas min? Mi planas publikigi etan kajeron pri tiu lingvo. Kion mi skribu pri la kreintoj de Relago?"

"Ĉu vi frezenas? Vi neniam skribu ke via onklo donas vin la materialon. Kaj pri la kreintoj de Relago mi tute ne scias ion", respondas Levi kolere.

Ludoviko ne rezignas. Denove kaj denove li ĝenas sian onklon per tiuj demandoj.

Unu tagon okazas io terura.

Ludoviko eniras sian ĉambron. Ĉie nigra fumo! Odoro de bruliĝinta ligno. La tuta planko malseka. La pordoj de la malnova, ligna ŝranko estas vaste malfermitaj. Ĉiuj pecoj da papero, ĉiuj liaj skizoj estas detruitaj. Estis patrino Rozalja, kiu rimarkis la fajron en la ĉambro. La flamoj venis el la ligna ŝranko. Rapid-

spirite ŝi enverŝis kelkajn sitelojn da akvo. Sed ŝi ne kapablis savi la enhavon. Ŝi nur provis forviŝi la akvon de la planko.




Fajro [12]*

Kiu repondecis por ĉi tiu fajro?

Estas raportite, ke la patro faris tion. Li ne deziris, ke Ludoviko daŭre okupiĝu per tiu ĉi projekto. Li uzu pli da tempo por sia lerneja kariero. Sed ne estas certe, ĉu vere kulpis la patro. Eble estis onklo Levi. Ĉar li deziris malebligi, ke Ludoviko indikas ion pri la aŭtoro en la planita publikigo de tiu ĉi lingvo.

Kompreneble Ludoviko estas detruita. Feliĉe ke li konservis preskaŭ ĉion en sia memoro. Tial li povas rekonstrui la plejmulton kun senlima energio kaj kreiveco. Nun li estas multe pli singardema. Li laboras sekrete kaj kaŝas siajn notojn. Li refoje prilaboras la materialojn. Fine en la jaro 1887 li publikigas la koncepton de la Internacia Lingvo sub sia pseŭdonimo Doktoro Esperanto.

Tamen li neniam raportis pri la skatolo kun la ŝtonoj.



La kvin ŝtonoj [13]

Lernado

Du novaj partoprenantoj en la klubo! Petra ĝojas ke Tim kaj Jens plialtigas la nombron de Esperantistoj. Ŝi eĉ venis unu horon antaŭ la komenco de la kluba vespero por subteni la komencantan lingvolernadon de la novuloj.

Unue ŝi provas turni la atenton de siaj 'lernantoj' al la reguloj pri prononcado. Sed Tim ankoraŭ ne estas preta. Li nepre volas paroli pri la novaj ekkonoj, kiujn li povis akiri de Gisela.

"Se ĉio ĉi estas vera, ĉu tio ne signifas ke Ludoviko Zamenhof kulpas pri plagiato?", li demandas.

"Nun, strikte parolante, certe. Sed tiel kiel la afero iris, li ne havis alian eblecon. Li ja ne rajtis indiki la fonton. Kaj krome gravas, ke Zamenhof plene prilaboris la lingvon. Li faris ĝin taŭga por nia tempo. Li zorgis pri sennombraj novaj vortoj", opinias Petra.

"Kaj li deĉifris la malnovan skribon! Tio vere estas admirinda, ĉu ne?", rimarkas Jens.

Tim konfirmas tion kaj aldonas: "Jes, kaj mi legis ke li ankaŭ difinis la alfabeton en latina skribmaniero. Li

bone certigis ke Esperanto estas ekzakte parolata ĝuste kiel la literoj diktas. Ĉiu sono laŭprincipe apartenas al ĝuste unu litero."

"Vi pravas! Sed nun ni devas komenci", admonas Petra la du.

Kiel la tempo forflugas! Petra nur sukcesas paroli pri la prononcado kaj la 16 bazaj gramatikaj reguloj.

Poste ili fiksas la sekvan rendezuon por la venonta semajno.

En la instituto

Post duona jaro:

Tim intense lernis Esperanton. Nun li jam povas legi kaj kompreni dikajn librojn, skribitajn en tiu lingvo. Li sukcese pasis la eniran ekzamenon en la Arkeologia Instituto en kiu ankaŭ laboras Viktor. D-ro Moinert, la ĉefo de la instituto, gratulas.

Finfine Tim rajtas labori kiel studenta asistanto. Al tiu instituto oni donis la misterajn ŝtonojn de la Kulturhistoria Muzeo en Magdeburgo.

La sciencistoj sukcesis atingi la tekstdatumojn, kiuj estis kaŝitaj en la stonoj. Kiel ili faris tion? Kompreneble estas sekreto.

Tim estas engaĝita por labori en la sekcio de la tradukistoj, kiuj traktas tiujn tekstojn. Kompreneble tio ne estas facila laboro, ĉar Tim nur duonjaron lernis Esperanton. Tamen li ne rezignas. Feliĉe ke ekzistas la bonegaj komputilaj tradukiloj. Ili produktas ofte tre agrablajn rezultojn, kiujn Tim povas akcepti grandskale sen problemoj. Kaj por la amaso da novaj vortoj ekzistas potenca vortaro.

La laboro estas interesa. Novaj temoj daŭre atingas lin. Li ne nur tradukas. Li ankoraŭ devas verki resumojn. Tio donas al li multan ĝojon. Restas nur unu neagraba flanko de la laboro. Ĉion li devas trakti tute sekrete. Eĉ dum la paŭzoj, en la kafejo, li ne rajtas paroli pri la tekstoj kun siaj kolegoj. Ĉiam ĉeestas iu el la administrado por observi kaj subaŭskulti. Tim devis subskribi ke li neniam portas informojn de la instituto al sia propra loĝejo. Ne sur sia komputilo, sur papero, aŭ alimaniere. La devontigo por silenti ankaŭ validas por la tempo post la fino de la laborrilato.

En la deklaro de konsento troviĝas parto, kiu ebligas neanoncitajn vizitojn de reprezentantoj de la instituto en lia hejmo. Do, ili povas ĉiutempe veni kaj eĉ rajtas kontroli liajn komputilon kaj smartfonon.

"Terure, tio estas vere malbonaj laborkondiĉoj. Feliĉe ke vi havas fenomenan memoron. Certe vi povas paroli pri tio dum nia venonta renkontiĝo en la bierejo", konsolas lin Jens komplete, speciale ĉar li rimarkas lian malĝojan mienon.

Tim respondas: "Konsentite, tion mi volonte faros. Sed atentu. Se oni kaptas min, mi ne nur perdas mian postenon. Mi estos punita kaj devus pagi grandan monsumon. Mi proponas ke ni ne renkontiĝu en la

apudeco de la instituto. Ni iru al restoracio, kiu estas pli malproksime."

"Ni faros tion eĉ pli singardeme. Ni iru sur diversaj vojoj al la renkontejo en la parko aŭ en la arbaro. Ni kunprenu nian bieron kaj tie ni povas senĝene babili, sen timo pro subaŭskultado", proponas Jens.

"Do, tio similas al la situacio en '1984', en la romano de Georg Orwell. Tie Winston renkontiĝas kun Julia en arbaro. En Oceanio eĉ la amo estas malpermesita. Sed ne estus problemo por ni ambaŭ, ĉu ne?"

Per tiu komentario la mieno de Tim subite heliĝas. Li moke ridetas.

Observado

"Hodiaŭ, posttagmeze, je la kvara, Imperiestra Monumento en la parko", flustras Tim al sia amiko Jens elirante de la prelegejo.

Li ne uzas la smartfonon por transdoni tiun rendezuon, ĉar li timas ke iu subaŭskultus lin. Jens kapjesas kaj ambaŭ iras sur apartaj vojoj hejmen.

Tim ne registras, ke la observantoj estas tute proksime. Estas du junaj viroj, preskaŭ ne distingeblaj de aliaj studentoj. Ili estas normale vestitaj. Truhavaj ĝinzoj, tro grandaj ĉemizoj, basbalĉapoj. Nur mankas unu aĵo, la malgranda tekokomputilo.

Ankaŭ irante el la prelegejo la du spionoj estis proksime malantaŭ Tim kaj Jens. Tio signifas, ke ili eĉ povis aŭdi la flustritan rendezuon.

Intertempe Tim alvenas en sia hejmo. Unue li iras en la kuirejon por trovi ion manĝeblan. Li preparas muslion miksante avenflokojn, lakton kaj bananon kaj englutas ĝin avide. Li ja la tutan matenon ne manĝis.

Hodiaŭ li ne bezonas iri al la instituto. Li devas prilabori la prelegon por havi sufiĉan materialon por sia referaĵo en la venonta semajno.

Hieraŭ, en la instituto li devis traduki tekston pri nuklea fuzio en reaktoro. Tio estis malfacile! Kial li ne pli bone sekvis la fizikajn lecionojn en lernejo? Denove, denove novaj fakvortoj! Deŭterio, tricio, plasmio, elektromagneto, eksoterma, neŭtronoj. Lia kapo zumas ankoraŭ hodiaŭ. Li nepre devas paroli kun Jens pri tiuj temoj. Jens ja estis en progresinta fizika kurso.

Survoje al la renkontejo Tim unue iras al la superbazaro. Kvar skatoloj da biero certe sufiĉus. Li ne forgesas du bulkojn kun grenoj kaj unu paketon da maĉgumo.

Ĉe la kaso la vico estas hodiaŭ tre longa. Tim havas tempon por rigardi tien kaj reen. Maljuna virino forlasas la vendejon kun sia irĉareto sur kiu pendas retsakoj. Io elfalas. Ŝi kliniĝas. Videblas ke tio kaŭzas problemojn al ŝi. Sed Tim ne povas helpi. Li estas kaptita en la longa vico antaŭ la kaso. Kial tiu junulo kun la griza basbalĉapo ne helpas? Li ja staras la tutan tempon ĉe la eliro. Sed li ne moviĝas. Ĉu hodiaŭ ĉiuj junuloj agas tiel?

Tim komencas pripensi. Butikĉaro puŝas lin. Li finfine atingas la finon de la vico kaj tuj poste iras al la parko.

Ĉe la Imperiestra Monumento Jens atendas jam.

"Ĉu vi jam delonge estas ĉi tie?", demandas Tim kaj proponas sidiĝi sur la longa benko apud la herbejo.

"Jes, mi staras ĉi tie ĉirkaŭ kvaronan horon. Sed ne gravas. Venu, ni trotadu unue."

Tio estas propono kiu surprizigas Tim. Li venis ja por paroli pri la laboro en la instituto. Sed Jens jam ekkuras antaŭen. Vole nevole Tim devas sekvi. Normale li ne havas emon por sporto sed Jens altigas la rapidecon.

"Kial tiel rapide? Kio okazas? Mi havas kvar skatolojn da biero en mia dorsosako."

Kaj nun Jens kuras al la eliro de la parko rekte al la butikuma strato. Kion signifas tio? Tim malrapide senspiras. Kun granda peno li haltigas Jens je la eniro de la grandmagazeno.

"Kio okazas? Kial vi kuras tiel rapide?", Tim ne povas trankviliĝi.

"Iru kun mi al la rulŝtuparo. Mi klarigos tion."

Jens atendis en la parko. Li rimarkis ke evidente iu observis lin. Estis juna viro, kiu staris apud la monumento. Jens ankaŭ vidis, ke alia ulo sekvis Tim kun sama rapideco, sed ĉiam tenante la saman distancon malantaŭ li.



Du spionoj [14]*

"Ni estas observataj! Ili certe havas kaŝitajn mikrofonojn kaj subaŭskultas nin. For! For! Rapidu! Morgaŭ ni renkontiĝos en la prelego!"

Post tiuj vortoj Jens malaperas inter la homoj, kiuj okupiĝas irante tra la koridoroj de la magazeno por butikumi.

Kontraŭspionado

"D-ro Kobus, tio ĝenas min. Ĉu tia observado estas eĉ laŭleĝa?", demandas Tim sian gvidanton de la laborgrupo, kiu tuj neas la akuzon:

"Tio ne eblas. Nia instituto neniam donis ordonon por observi vin. Tiuj uloj eventuale estas spionoj de la konkurenco. Nia instituto ricevas ja multan financon subtenon de diversaj konzernoj kaj firmaoj. Ili investas en niaj esplorprojektoj. Rekompence ili rajtas parte uzi la rezultojn de nia esploro. Mi pensas, ke ankaŭ la konkurenco havas intereson profiti de tio."

"Dankon, tio trankviligas min, d-ro Kobus. Mi jam pensis pri ĉesi la laboron kaj forlasi la instituton. Kaŝsekvado estas ja malpermesita!"

D-ro Kobus konfirmas tion: "Vi pravas. Tio estas kontraŭleĝa. Sed bedaŭrinde mi ne povas helpi vin. Mankas ja la pruvoj. Eventuale vi havas ideon por tio."

Tim pensas pri kontraŭrimedoj kiuj povas esti uzataj por batali ĉi tiun kaŝobservadon.

Sed eventuale povas esti ke tiuj uloj nur hazarde aperis kaj ĉio estas nur fantazio.

En la Esperanto-grupo li raportis pri tio, kio okazis. Petra proponas:

"Mi simple trompus ilin. Faru tion tiamaniere, ke ĵus certiĝas ke tio ne estis nur fantazio."

Tim demandas kun dubo: "Kiel? Kiel tio funkcius? Ĉu ni komencu kontraŭspionadon?"

"Jes, kial ne? Simple interŝanĝu tekstojn per smartfono. La enhavo devas esti la informo pri via nova rendezuo. Kaj krome menciui interesan temon, sed nur enmetu tian, kiu neniel estis traktita en via instituto."

Tim pensas ke tiu ideo ne estas malbona. Li parolas pri tio kun Jens post la prelego. Ili konsentas renkontiĝi sur la granda ludejo en la parko. La interkonsentita temo estu 'Novaj medikamentoj kontraŭ demenco'. Jens planas kaŝi sin unu horon antaŭ la kunveno. Li volas ja observi la scenejon. Ĉifoje li ne forkurus se la fiuloj vere venos. Li volas ŝajne tute normale sidi kun Tim sur la benko kaj trinki bieron.

"Kaj poste? Kion ni faru?", demandas Tim.

"Kial? Ni faros nenion. Mi provas foti la ulojn antaŭen. Kaj kiam niaj bierskatoloj estos malplenaj, ni simple reiros. Mi pensas ke ili ankaŭ ne faros ion."

La propono de Petra kondukis al la dezirata rezulto. Denove Tim estis sekvata dum li iris al la parko. Ĉe la ludejo Jens kaŝis sin. Li elektis etan lignan domon, konstruitan por infanoj. Li devis fari sin tre malgranda por eniri kaj suferis pri kramfoj, ĉar li devis longe elteni la situacion. La fiulo alvenis nur dek minutojn antaŭ la celita tempo.

Jens multe fotis. Li poste elprenis la memorkarton kaj kaŝis ĝin en sia poŝo kaj enmetis freŝan en la aparaton. Rapide li faris ankoraŭ unu foton kaj tiam li grimpis singardeme el sia kaŝejo. Li iris al la benko kaj sidiĝis apud Tim.

La spionoj estis kaŝitaj en la arbustoj malantaŭ la arboj. Ili povis vidi, ke Jens rampis el la luddometo.

Jes, ili rimarkis, ke ili estis trompitaj.

Nun la situacio iĝis danĝera.

Danĝero

"Sidiĝu kviete" flustras iu, kiu ŝteliris de malantaŭe al la benko.

Estas unu de la spionoj, kiuj malantaŭe embuskis en la arbustoj. La alia siblas:

"Tion vi ja bone pripensis. Sed ne turniĝu. Mi povus hazarde vundi vin per mia ĉastranĉilo. Kaj tiam ĝi malpuriĝus."

Tim kaj Jens tremas pro timo. Ili ĵus malfermis la bierskatolojn kaj volis tosti al la sukceso.

"For kun la biero! La kamerao! Donu ĝin al mi! Alikaze vere estas problemo", minacas tiu kun la tranĉilo.

Jens provas respondi kun turmentita trankvila voĉo:

"Bone, bone, nur ne paniku. Jen la aparato. Ni ja ne volas disputi."

Sed Tim krias: "Ĉu vi frenezas? Tio estas la mia. Nur ne fordonu la kameraon!"

"Bone, ni havas sufiĉe da fotiloj. Sed nun la memorkarton! Donu ĝin tuj!", postulas la ulo kun la tranĉilo.

Jens sen protesto elprenas la memorkarton el la kamerao kaj transdonas ĝin al la agento kun la rimarko:

"Ĝi havas memoraĵon de 128 gigabajtoj, la rapideco por transsendi datumojn estas 200 megabajtoj per sekundo."

"Vi estas fiaskuloj kaj fanfaronuloj. Nur restu sidantaj sen turniĝi!", flustras la agento sen tranĉilo. Ambaŭ malaperas en la parkon.

"Puh, tio estis aĉa. Sed damne, nun niaj pruvoj estas for", plendas Tim.

"Nur for de ĉi tie", opinias Jens. Li eksaltas kaj kuras kun Tim for el la parko. Li kuras rekte al la policejo kiu situas ĉe la forejo.

La pruvoj kompreneble ne estas perditaj. Jens ja lerte prenis antaŭzorgojn. Li povas nun transdoni la 'ĝustan' memorkarton al la policisto al kiu ili raportas la okazojn. Li rapide taksas la aferon:

"Jes, ni konas tiujn ulojn. Ili jam ofte minacis homojn. Respekton. Vi vere bone agis. Bone, ke nenio alia okazis."

Post unu semajno Tim ricevas leteron de la polico. Ili povis kapti la du agentojn. Traserĉante ilian loĝejon la polico trovis multajn signojn de aliaj krimoj. Ili eĉ trovis la memorkarton de Jens. Ĝi disponis ankoraŭ pri spaco da 120 gigabajtoj, ĉar estis ja nur unu foto sur ĝi.

La du spionoj verŝajne agis nome de la konkurenca energikonzerno 'MegaServ'. Sed tio ne povis esti pruvita.

En la kantino

Tim kaj Jens renkontiĝas en la kantino de la universitato por mantenmânĝo.

Preskaŭ ĉiuj sidlokoj estas okupitaj. Ne, ĉi tie ne regas trankvila etoso. Ĉie klakas teleroj kaj manĝilaroj. Ĉie la homoj laŭte babilas. La kantino estas taŭga loko por komunikado inter la studentoj.

"Ĉi tie certe ne estas subaŭskultado. Krome ni ja bone trompis la ulojn. Mi pensas ke ili ne estas tiel rapide vidataj", opinias Jens.

"Jes, mi ankaŭ ĉirkaŭrigardis. Mi pensas, ke hodiaŭ ili ne ĉeestas. Tiam mi finfine povas raporti al vi."

Li rakontas pri sia traduklaboro kaj la tekstoj kun la priskriboj de la energiproduktado, ĉefe pri la nuklea fuzio. Tion li traktis antaŭ pli ol unu semajno, sed li havas ankoraŭ la plej gravajn informojn en sia memoro.

"Ĉu vi vere komprenis ĉion? Ĉu vi tiel bone regas Esperanton?", demandas Jens.

"Jes, rilate al la lingvo ne estis problemo. Sed mi ja ne komprenas la signifon de tiuj informoj. Mankas al mi la scioj pri fiziko. Mi ne estis kiel vi en altnivela kurso pri fiziko. En la lernejo mi nur lernis, ke fuziaj reaktoroj produktas multegan energion. Krome estas metodo kiu supozeble ne damaĝas la medion, ĉar apenaŭ iu rubo estas produktata."

Jens kontente ridetas. Nuklea fuzio. Ja, tio estis grava temo en la lernejo. Sed li memoras, ke tio estis nur projekto por la futuro. En lia lerneja tempo neniu kredis pri ebla realigo. Ĉu nun la trovitaj tekstoj povas antaŭenpuŝi la aferon?

"Saluton, vi pigraj porkoj. Ĉu vi ne devas iri nun al la seminario?", demandas Viktor.

Li prenas teleron kun salato kaj eksidiĝas ĉe la du. Provokeme li metas falditan gazeton sur la tablon.

"Kial vi faras tion? Ĉi vi volas montri, ke vi estas saĝa? Ĉu vi eĉ povoscias legi?", pikmokis Jens.

"Vi tute ne scias, kio mankas al vi, se vi ne legas gazeton. Aŭ ĉu vi konas la rezulton de la lasta futbala ludo de nia teamo?"

Neniu interesiĝas pri la futbala ludo. Sed la dika titollinio kaptas ilian atenton. Ĉi tio ne indikas ion pri la futbala ludo. Temas pri nuklea fuzio!

La energikonzerno 'Tokamata' planas konstrui novan fuzian reaktoron. Tio estos la plej granda en la mondo. La firmao varbas centojn da novaj laboristoj.

Ĉu povas esti, ke Tim per sia eta traduko donis decidan kontribuon al la progreso? Tim scivoleme trafoliumas la gazeton kaj tuj trovas la borsajn novaĵojn.

La akcia prezo de Tokamata plialtiĝis je 55 %!

Demandoj

"Ĉu vi jam aĉetis akciojn de Tokamata, Tim? Mi havas ankoraŭ eĉ pli bonan proponon. Kial ne investi en 'Kosmastart'? Tio estas ĉi tie la plej granda konzerno por spacveturado. Ili ankaŭ kunlaboras kun nia instituto", proklamas Viktor.

Ĉifoje estis Viktor, kiu povis plibonigi la ekonomian situacion de kompanio per sia traduklaboro. 'Kosmastart' apartenas ankaŭ al la firmaoj, kiuj konsentis pri proksima kunlaboro kun la universitato. La traktitaj tekstoj rilatas al nova teknologio por pli rapide movigi la spacoŝipojn.

Tim ne povas akcepti tiun proponon: "Ne, ne, mi ne sufiĉe komprenas la aferon. Krome, tion mi diras honeste, mi nur havas monon por aĉeti bongustan deserton al vi. Por akcioj la mono neniam sufiĉus."

Dum la vespero Tim malrapide kaj penseme promenas al la klubo. Ĉu vere la situacio estas tiel, kiel Viktor opinias? Ĉu tio ne signifus, ke nun estas multaj, kiuj interesiĝas pri tio kaj volas gajni monon? Sed kial ĉiam aliaj gajnas? Li mem ja nur ricevas salajreton.

Tim planas priparoli la aferon en la Esperanto-grupo sen doni indikojn pri sia traduklaboro, ĉar tio estas ja malpermesita.

Antaŭ la regula sinsekvo de la programo ĉiu en la klubo rajtas paroli pri mem elektita temo, ĉu novaĵoj aŭ demandoj. Tim jam preparis la frazojn en Esperanto mense. Ĉio nun atendas en lia kapo. Sed ankoraŭ ne estas facile por li, libere paroli. Li komencas:

"Kion vi pensas? Imagu, ke vi trovus malnovan kofron kun trezormapo. Per tiu vi venas al granda skatolo tute plenigita kun pecoj da oro. Sed ne estas indiko pri la posedanto. Ĉu vi rajtas teni la skatolon?"

"Mi pensas, ke estas juraj reguloj pri tio", opinias Viktor, "vi nepre devas informi la ĝustan instancon, se temas pri multvalora aĵo."

"Jes, sed se poste la posedanto ne kontaktas la instancon, la trezoro iĝas posedaĵo de la trovinto post certa tempo, ĉu ne?", demandas Petra.

"Tio ne estas tiel simpla. Tio estas nur ĝusta se temas pri normalaj aĵoj. Multvaloraj trezortrovaĵoj apartenas al la ŝtato, mi pensas. Eventuale vi ricevas etan

kompenson, sed tio ne estas granda monsumo", rimarkas Jens.

"Kompreneble. Tio ja ankaŭ validas, se vi trovas oleofonton en via propra tereno. Tio estas ĉiuokaze posedaĵo de la ŝtato", emfazas Viktor.

Post tiuj paroladoj Tim ne plu povis koncentriĝi al la regula temo de la kluba vespero. Hodiaŭ temas pri Portugalio, pli precize vojaĝraporto.

La pensoj pri la valoro de la tekstoj, kiujn li devas traduki, daŭre vagadas en sia kapo. Tiuj informoj estas ankaŭ trovaĵoj, kiuj nek apartenas al la instituto nek al la konzernoj. Ili certe apartenas al la heredaĵo de la homaro.

Salutoj el la antikvo

"Finfine venas io alia. Ne nur ĉiam tekniko kaj naturscienco", ĝojas Tim, kiu ĵus laboras pri la tradukotaj tekstoj. La traktata materialo tute malsamas ĉion, kion li ĝis nun tuŝis. Estas raporto el la antikvo.

Tiu teksto estas skribita de iu, kiu prezentas sin kiel ano de la 'relaganoj'. Li informas pri sia popolo kaj ties vivmaniero. Tiu temo certe ne estas tiel interesa por la konzernoj, kiuj kunlaboras kun la instituto. Ili verŝajne preferus la profitdonajn temojn el la antaŭaj tekstoj. Sed por Tim estas io, kio mankas al li delonge.

Li nun certe ricevos informojn pri la origino de la misteraj ŝtonoj. La teksto traktas ankaŭ aliajn setlejojn en diversaj partoj de la mondo. En la tiama tempo la tie loĝantaj homoj estis sur tre malalta evolua stato. La 'relaganoj' estis ege superaj al la homoj, kiuj vivis en tiu tempo. Ili disponis pri teknikoj kaj kapabloj, kiujn ni ne povas imagi.

Ili havis ekzemple flugmaŝinojn kaj eĉ spacoŝipojn. La metodoj por produkti energion estis ĉefe daŭripovecaj, tio signifas ke ili uzis la sunon, la venton kaj akvoforton.

Sed ankaŭ troviĝas informoj pri la uzo de nuklea energio kaj, kiel Tim jam eksciis, estis reaktoroj por nuklea fuzio. La 'relaganoj' fondis setlejojn en diversaj partoj de la mondo. Tie kelkfoje evoluiĝis grandaj urboj. Multaj homoj diskutas ĉu la 'relaganoj' eĉ estis la veraj konstruistoj de la piramidoj.

En la sekvanta teksto la raportisto traktas la vivmanierojn kaj la regulojn por kunvivado. Tiu popolo celis al paca vivo ne nur ene de la propra komuno. Ili ankaŭ volis pace kunvivi kun la aliaj homoj. Sed tio evidente ne funkciis.

Je la fino de la raporto Tim legas priskribojn de teruraj militoj kaj ankaŭ pri epidemioj kaj aliaj katastrofoj. Tiam subite la teksto finiĝas sen klarigo.

Tim vere bedaŭras ke pri la ŝtonoj ne troviĝas iaj indikoj.

Ĉi tiuj informoj estas registritaj kun granda intereso de la administrado de la instituto. La nekompleta 'saluto el la antikvo' ŝajnas promesi ekstrajn sensaciajn eltrovaĵojn.

Tim estas plurfoje admonita, neniam transdoni la novajn informojn al aliaj.

Koruptado

"Ĉu vi jam legis tiun novaĵon?", demandas Viktor kaj movas la gazeton rekte antaŭ la nazon de Tim. Tie staras, skribita en grandaj, dikaj literoj:

Akuzo pri koruptado - Direktoro silentas

"Koruptado? Kiel? Kio? Nia d-ro Moinert? Ĉiuj ja ŝatas lin. Estis li, kiu konvinkis tiom da firmaoj kunlabori kun ni", respondas Tim. Jens konfirmas tion. Ankaŭ li scivoleme rigardas la titollinion.



D-ro Moinert [15]*

"Jes, ĵus pri tio temas. Li verŝajne tro bone kunlaboris. Laŭdire li enpoŝigis kelkcent mil eŭrojn, kiujn li ricevis de la Tokamata-konzerno."

Viktor donas la gazeton al Tim kaj iras al la kafomaŝino. Tim legas denove sed ne povas kredi ke la direktoro agis tiel. Li daŭrigas la legadon kaj trovas intervjuon, kiun faris la ĉefa redaktoro de la gazeto kun d-ro Moinert.

D-ro Moinert malkonfesas la akuzojn. Li emfazas ke li ĉiam zorgis pli la bonaj rilatoj al grandaj firmaoj. Krome li atentigas pri la pozitivaj efikoj de tiu kunlaborado. Ne nur la instituto, la urbo kaj la tuta regiono profitas pro tio. Mondonacojn li neniam akceptis.

"Se vere estas tiel, ni atendu la venontajn esplorojn. Ni vidos, kio aperas. D-ro Moinert devas esti traktata kiel senkulpulo ĝis estos kontraŭa pruvo.", opinias Jens.

"Ho, ho. Tiu senkulpa? Ĉu vi vere kredas tion? Jam lastan jaron estis novaĵo pri esplorfondusoj kiuj estis neleĝe uzataj. Post kontrolo de la kontoj la inspektistoj trovis, ke 200000 eŭroj ne estis laŭorde repagitaj al la administracio. Anstataŭe d-ro Moinert simple metis kelkajn nomojn de kunlaborantoj el aliaj

sekcioj sur la liston de liaj dungitoj. Pri tio hodiaŭ neniŭ parolas. Verŝajne iu lerte kaŝis tiun aferon", grumbas Viktor.

"Ho, vidu! Ĉi tie estas ankoraŭ alia interesaĵo", rimarkas Tim, kiu tralegis la intervjuon iom pli detale.

La ĉefredaktoro mencias rumorojn, ligitajn al la aktualaj projektoj de la instituto. Li demandas ĉu la instituto vere traktas amasojn da tekstoj, kiuj venas el la antikvo. Kaj ke tiuj tekstoj estas skribitaj en iu sekreta lingvo.

"Rigardu! Finfine estas unu, kiu rompas la silenton. Mi pensas, ke eĉ pliaj sekretoj estos malkaŝitaj kaj fariĝos pli publikaj. Viktor! Alportu denove vian gazeton morgaŭ!", postulas Jens.

"Jes, ni atendas ke la ĵurnalistoj finfine ankaŭ skribas ion pri la ŝtonoj kaj la metodoj, kiuj ebligas aliron al la storitaj datumoj. Tio estos pli interesa ol koruptado.", rimarkas Tim.

Eksciteco

"Tio iĝas ja eĉ pli interesa", murmuras Tim dum tradukado de novaj tekstoj.

Finfine li trovas indikon pri la ŝtonoj, pli detale pri tiu ŝtono kun la kvin nigraj ringoj. Tiu ŝtono ĝis nun estis granda enigmo por la sciencistoj. Ili ne sukcesis deĉifri la storitajn datumojn. Tute malsama formato estis uzata por organizi ilin.

Sed nun la projekto antaŭeniras per granda paŝo. La sciencistoj post longa laboro venkis la problemojn. La deĉifrado sukcesis kaj ne nur la fakuloj miras pri la rezulto. Ekscito kaptas la tutan instituton ĉar en la kvina ŝtono kaŝiĝas bildoj, sondosieroj kaj filmoj. Tion neniu atendis!

Feliĉe ke Tim ne devis trakti la plurmediajn datumojn. Por fari tion li ne havas la fakan kompetencon. Sufiĉas ke li povas trakti la tekstojn. Tamen li estas scivolema.

Kiam la instituto ebligos prezentadon por ĉiuj, ne nur por la kunlaborantoj?

"Grandioze", aplaŭdas Viktor, "Se la publiko aŭdas pri tio, tiam la instituto ne plu povas teni la projekton sekreta."

Tim konsentas: "Ankaŭ mi kredas tion. Sed tio certe kaŭzos problemojn por nia instituto. Ĉu vi scias, kiuj reguloj validas por la rajtoj uzi tiujn informojn? Ĉu ne ekzistas internaciaj interkonsentoj pri tio? Temas ja pri heredaĵo kiu fakte apartenas al la tuta homaro."

"Certe, sed mi nur scias malmulton. Verŝajne neniu zorgas pri tio ĉiukaze. Necesas havi kuraĝan denuncianton."

"Aŭ denunciatinon. Ŝi certe estus pli kuraĝa ol ni."

La du kompreneble pensas pri Petra, sed ŝi ne laboras en la instituto. Tamen ŝi havas bonajn rilatojn al multaj homoj. Ŝi estas ja aktiva Esperantistino. Ŝi certe konas iun, kiu ankaŭ konas iun, kiu konas ...

Hodiaŭ vespere Tim ne sukcesas iri al la klubo. Li raportas ĉion al Jens kaj petas lin transdoni la ideon al Petra. Kompreneble inter kvar okuloj.

En la instituto intertempe disvastiĝas ĉiam pli malkvieta etoso. Ĉie la pordoj malfermiĝas kaj fermiĝas. Ĉie iu enkuras aŭ eliras.

La estro de la instituto kunvenigas ĉiujn gravajn laborantojn de la sekcio, kiu traktas la analizon de la datumoj. Tim ne apartenas al ili. Li estas nur studenta asistanto.

Por d-ro Moinert la nova evoluo estas beno, kiu povas helpi firmigi lian pozicion en la instituto. Pro tiel sensacia eltrovaĵo verŝajne neniu plu pensos pri la akuzoj pri koruptado. Tiuj konsideroj igas lin kuraĝe riski la 'fuĝon antaŭen'.

Li informas la amaskomunikilojn.

Aŭdvida komunikado

Ĉiuj sidlokoj en la prelegejo de la Arkeologia Instituto estas okupataj. Tim, kune kun Petra sidas en la unua vico. D-ro Moinert, la ĉefo de la instituto, bonvenigas la kunvenon kaj donas etan klarigon pri la evento. Dum tio li emfazas la sensacian signifon de la eltrovaĵoj, kiujn lia teamo trovis analizante ŝajne simplajn ŝtonojn. Li esprimas sian dankon por la bona laboro al la tuta teamo. Tiam li donas la signalon por prezenti la unuan filmon.

Nigraj haroj, ĝis la ŝultro. Homogena helbruna haŭtkoloro. La brovoj zorgeme tonditaj. Helblua koloro inter la brovoj kaj la supraj palpebroj. Longaj okulharoj. La lipoj kun forta ruĝa ŝminko. Ĉirkaŭ la kolo riĉe ornamita ora kovrilo de la ŝultroj. Belega stilo, ruĝa dekoro. Orkolora robo, kiu strikte kovras la korpon emfazante la formon. La brakoj nekovritaj. Je la dekstra pojno larĝa braceleto farita el malhelbruna plektaĵo.

Oni eble pensas, ke fama belulino prezentas sin. Ŝi estas la parolantino, videbla en la unua parto de la filmo. Ĉu ŝi estis la 'televidanoncistino' de la relaganoj? Ŝi deklamas sian tekston en belsona lingvo. Estas Relago, la antaŭulo de la hodiaŭa Esperanto. La

kvalito de la sondosiero estas bonega. La klara prononcado de la parolantino garantias ĝustan komprenemon.



Amera [16]*

En la prelegejo ĉiuj komencas flustri.

"Kiu estas ŝi? Kiel ŝi parolas! Kiu lingvo estas tio?"

Petra nur mallaŭte diras al Tim: "Tion mi bezonas kiel sondosieron por mia komencanta kurso."

D-ro Moinert interrompas la prezentadon kaj petas la ĉefon de la tradukteamo interpreti. Li komencas:

"Nia belega parolantino afable salutas vin ĉiujn. Poste ŝi mallonge prezentis sin. Ŝia nomo estas Amera. Ŝi estas la filino de la reganto de Mirkasma."

Amera nun donas superrigardon por la enhavo de la unua filmo kaj indikas, ke sur la kvina ŝtono troviĝas multaj kromaj filmoj. Ilia celo estas detale informi la posteularon pri la relaganoj.

Mirkasma estas regiono en la hodiaŭa Irako. Tie troviĝas la eta regno de la relaganoj. La filmo montras la montetan pejzaĝon. La montoj portas nur malabundajn arbarojn. Ĉe la bordoj de la rivero, kiu meandras tra la valo, montras sin vastaj, verdaj herbejoj.



Pezaĵo en Mirkasma [17]*

Ĉiuj bildoj estas akompanitaj per mallaŭta muziko kiu sonas orientale. Ne estas komentoj.

Subite la parolantino revenas kun sia softa voĉo. Ŝia bildo denove videblas en granda formato. Estas la belega anoncistino de la komenco de la filmo.

Petra rimarkas, ke Tim subite pli atenteme spektas la filmon.

"Mi pensas, ke vi ŝatas tiun virinon, ĉu ne?", ŝi pikmokus kaj vere, ŝi pravas.

"Kompreneble. Ne estas mirinde. Vi ne povas nei, ke ŝia aspekto estas tre bona. Estas nur bedaŭrinde ke ni ne povas reiri al la pasinteco", konfesas Tim kun rideto. Li provas nun denove koncentriĝi al la filmo.

La parolantino donas pliajn priskribojn pri la montrita regiono. La relaganoj vivas kun striktaj reguloj. Tiuj postulas, ke la ĉirkaŭa naturo povas esti nur zorgeme uzata, tiel ke ĝi ne suferas de damaĝoj de la loĝantaro. Tial en Mirkasma preskaŭ ne troviĝas konstruaĵoj. Ankaŭ mankas stratoj.

Sur sabla ebenaĵo for de la rivero tamen staras granda kubforma bloko. Ĝi estas uzata kiel halo por

flugmaŝinoj. La parolantino emfazas, ke ĉiu konstrumaterialo konsistas el plantaj substancoj.

Ĉiuj loĝejoj de la relaganoj troviĝas sub la tero. La filmo montras eniron al giganta kaverna sistemo. Tie estas vastaj koridoroj kaj haloj. Ĉie disbranĉiĝas mallarĝaj vojoj al pli malgrandaj kavernoj. Tie la relaganoj loĝas kaj laboras.

Je la fino de la filmo juna paro prezentas kanton akompanate de kelkaj muzikistoj. Ili ludas strangaspektajn instrumentojn. La teksto estas kompreneble en Relago. Ne nur ĉe Tim restas la alloga melodio longe en la kapo.

D-ro Moinert fermas la eventon kaj referencas al la laboro en la instituto, kiu kompreneble ankoraŭ ne estas finita. Li promesas pli da filmprezentoj por la venontaj monatoj.

Progreso

Nun la eventoj tre vigle disvolviĝas. Ĉiuj medioj konas nur unu temon. La filmo de princino Amera aperanta en la reto estas klakita de pli ol unu miliono da homoj en tre mallonga tempo. Ili tuj transdonas la informojn kaj tiel kaŭzas retan 'lavangon'.

Pro tio baldaŭ aperas la bildo de Amera en preskaŭ ĉiuj gazetoj por virinoj. Amera estas nedemandite motoro por nova modo. Ĉie la inoj provas kopii la aspekton de la princino. La ekonomio estas floranta.

Ankaŭ la Tokamata-konzerno, Kosmastart kaj la aliaj firmaoj, kiuj kunlaboras kun la instituto, registras pli grandan intereson por siaj akcioj. Sed post kelkaj tagoj la evoluo estas bremsata.

D-ro Moinert retiriĝas. Evidentiĝis, ke ne nur la akuzoj pri koruptado forte pezis lin. Kromaj akuzoj aperis, ĉar li tenis ĉiujn projektojn de la instituto tute sekretaj. Laŭ la reguloj de la universitato la administrado de la instituto malobeis multajn gvidliniojn.

Speciala riproĉo estas la nekontrolita transdono de la eltrovaĵoj al la konzernoj.

La respektivaj firmaoj rapide reagis. En komuna deklaro ili anoncas starigon de bonfara fonduso. Gravaj financaj rimedoj el la ekspluatado de la eltrovoj regule fluos al tiu fonduso.

La universitatoj ĉie en la lando registras pli altan intereson por la studo de arkeologio. Amasoj da demandoj atingas la muzeojn. Ĉiu volas scii ĉu estas ekspozicio de objektoj de la relaganoj. Kaj ĉiu nuntempe volas scii plu pri Esperanto. Ĉiuj Esperanto-kluboĵ raportas pri enormaj nombroj da vizitantoj kaj neatenditajn aliĝojn por lingvokursoj.

Pri tio ĝojas ankaŭ Petra, Viktor, Tim kaj Jens.

Sed kion faras Ludoviko? Ĉu li ne estas tiu, kiu estus la plej feliĉa?

Postparolo

Kion faros Tim en la estonteco? Li certe daŭrigas sian studon de arkeologio.

Ĉu li daŭre okupiĝos kun la Internacia Lingvo eĉ post kiam li finos sian okupon kiel tradukisto?

Kaj kio okazos kun la multnombraj eltrovaĵoj kaj ideoj? Ili ja nur atendas la ĝustan tempon por eliri de la misteraj ŝtonoj.

Por ĉi tiuj demandoj tiu rakonto ne donas informon.

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn kaj plenigu la mankojn!

Grandan dankon al Theodor Wittenberger kaj Robert Bogenschneider por la kontrolo de la teksto kaj al ĉiuj, kiuj helpis plibonigi la rakonton.

Kolofono

Titolo

La kaŝita trezoro de Ludoviko

Origina titolo

Ludwigs verborgener Schatz

Versio 1.1

1-a Eldono, 2023

Aŭtoro

Erik Tantal, alinome Klaus Frieŝe

Traduko

Klaus Frieŝe

Aŭtoraj rajtoj

© Klaus Frieŝe, Hamburg

Retpoŝto

frieŝe@esperanto-hamburg.de

Titolbildo

Erik Tantal

Hejmpaĝo

esperanto-klaus.de

Fontoj por la bildoj

[06] <https://de.wikipedia.org/wiki/Esperanto-Symbole>

[09] https://de.wikipedia.org/wiki/Ludwik_Lejzer_Zamenhof

[18] vidu supre

[13] mia foto

La markitaj bildoj [*] estis generitaj de artefarita intelekto per Craiyon (<https://www.craiyon.com/>).



Ludoviko kiel gimnaziano [18]

